
# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



MONDA KOMUNIKA JARO

1983 · 1 · (95)




ŜLOSILO AL VIA SANO
ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ

KURACRESTADOJN EN ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ CERTIGAS
KAJ PLUAJN INFORMOJN PRI UNUOPAJ BANEJOJ DONAS:

BALNEA, reprezentace československých lázní a zřídel,
Pařížská 11, 110 01 Praha 1, ČSSR
Telex 122 215, Telefon 263 777

BALNEA
PRAHA


# JUBILEOJ 1983

## 1. GRAVAJ SOCIPOLITIKAJ JUBILEOJ

25.02.1948 35-a jubileo de la TRIUMFA FEBRUARO /venko de la ĉeĥoslovaka laborularo/

28.10.1918 65-a jubileo de FONDIĜO DE ĈEĤOSLOVAKIO /1945 - Tago de Naciigo; 1968 - Tago de Ĉs. Federacio/

## 2. ĈEĤAJ KAJ KELKAJ INTERNACIAJ JUBILEOJ DE UNESKO KAJ DE LA MONDA PACKONSILIO

La jaron 1983 Unesko proklamis "Internacia Komunika Jaro" kaj la ĉeĥoslovaka registaro "Jaro de Ĉeĥa Teatro".

22.01.1883 naskiĝis Vincenc BENEŠ, ĉeĥa pentristo kaj grafikisto /Unesko - 100 j./

30.01.1948 murditа Mahatma GANDI, reprezentanto de hinda kontraŭbrita rezista movado - 35 j.

22.02.1883 naskiĝis Jaroslav KOCIÁN, ĉeĥa violonisto kaj komponisto /Unesko - 100 j./

23.02.1903 naskiĝis Julius FUČÍK, ĉeĥa nacia heroo - 80 j.

14.03.1883 naskiĝis Otakar NEJEDLÝ, ĉeĥa pentristo kaj profesoro de la Belarta Akademio /Unesko - 100 j./

06.04.1483 /aŭ 28.03.?/ naskiĝis Rafael SANTI, itala renesanca pentristo /Unesko - 500 j./

30.04.1883 naskiĝis Jaroslav HAŠEK, ĉeĥa verkisto, aŭtoro de la mondfama libro "Brava Soldato Švejk" /Unesko - - 100 j./

05.05.1818 naskiĝis Karl MARX, fondinto de scienca socialismo - 165 j.

10.05.1883 forpasis Samo CHALUPKA, slovaka poeto /Unesko - - 100 j./

17.05.1873 naskiĝis Henri BARBUSSE, franca revolucia poeto, kontraŭfaŝisto, favoranto de Esperanto - 100 j.

19.05.1783 naskiĝis Jan Nepomuk ŠTĚPÁNEK, ĉeĥa dramatikisto, /Unesko - 200 j./

20.05.1883 naskiĝis Otakar FISCHER, ĉeĥa kritikisto, historiisto kaj tradukisto /Unesko - 100 j./

20.05.1883 naskiĝis Jan KAŠPAR, pioniro de ĉeĥa aviatiko /Unesko - 100 j./

28.05.1883 naskiĝis Václav TALICH, ĉeĥa dirigento, longjara estro de Ĉeĥa Filharmonio /Unesko - 100 j./

03.06.1963 forpasis Nazim HIKMET, fama kontraŭmilita turka poeto - 20 j.

03.07.1883 naskiĝis Franz KAFKA, germana verkisto, loĝinta en Prago - 100 j.

14.08.1958 forpasis Jean Fréderic JOLIOT-CURIE, franca nuklea sciencisto, pacdefendanto - 25 j.

09.09.1883 naskiĝis Václav VOJTÍŠEK, elstara ĉeĥa historiisto kaj heraldikisto /Unesko - 100 j./

05.10.1883 forpasis Joachim BARRANDE, franca geologo, laborinta en Bohemujo /Unesko - 100 j./

22.10.1883 naskiĝis Otakar KUBÍN /COUBINE/, ĉeĥa pentristo, meritinta artisto, longe laborinta en Francujo /Unesko - 100 j./

24.10.1883 naskiĝis MUD-ro Jiří BRDLÍK, ĉeĥa infankuracisto, /Unesko - 100 j./

10.11.1483 naskiĝis Martin LUTHER, religia reformisto, fondinto de la protestantismo - 500 j.

18.11.1883 NACIA TEATRO fondita en Prago /Unesko - 100 j./

25.12.1938 forpasis Karel ČAPEK, mondfama ĉeĥa verkisto, aŭtoro de ofte esperantigataj verkoj - 45 j.

### 3. JUBILEOJ DE LA INTERNACIA ESPERANTO-MOVADO:

01.05.1908 fondita UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en Ĝenevo - 75

06.09.1953 fondita MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO /MEM/ en Sankt Pölten /Aŭstrio/ - 30 j.

### 4. JUBILEOJ DE LA ĈEĤA ESPERANTO-MOVADO:

12.03.1858 naskiĝis Josef EISELT, pioniro de E-o, la unua prezidanto de Ĉs. Esp-ista Asocio - 125 j.

25.12.1858 naskiĝis Karel Emanuel MACAN, blinda komponisto, fondinto de la Societo de ĉs. nevidantaj Esperantistoj /SOĈNE/ - 125 j.

10.01.1878 naskiĝis Theodor ČEJKA, kunfondinto de la ĉeĥa Esperanto-movado - 105 j.

15.09.1878 naskiĝis prof. Rudolf FRIDRICH, pioniro de E-o, tradukisto - 105 j.

16.02.1883 naskiĝis Albín NEUŽIL, pioniro kaj prezidanto de la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj-Esperantistoj /TAGE/ - 100 j.

10.11.1883 naskiĝis D-ro Stanislav KAMARÝT, kunfondinto de EK Praha, prezidanto de EA ĈSR, redaktoro kaj verkisto - 100 j.

21.09.1888 naskiĝis nacia artisto Martin BENKA, slovaka pentristo-esperantisto - 95 j.

12.07.1898 naskiĝis fama tradukisto de la ĉeĥa poezio Jindřich JEŽEK-ERINACO - 85 j.

14.10.1903 naskiĝis Jaroslav NOVOBILSKÝ, elstara ĉeĥa esperantisto murdita de naziistoj en Mauthausen - 80 j.

17.09.1913 naskiĝis Jiří V. ŠAMLA, redaktoro, aktivulo de la "Verda Stacio" - 70 j.



22.12.1913 naskiĝis Jaroslav MAŘÍK, verkisto, tradukisto, kunfondinto de la "Verda Stacio", grava kunhelpanto por tiu ĉi rubriko - 70 j.

31.08.1918 naskiĝis en Kaposvár Valdemar VINAŘ, teatra reĝisoro, esp. beletristo - 65 j.

1918 naskiĝis Jožka STANĚK, progresema ĵurnalisto, dua prezidanto de MEM - 65 j.

1923 la unua Esperanta radioelsendado en ĈSR /stacio Kbely, d-ro A. Pitlík/ - 60 j.

1933 fondita grupo TRAKT /Teatro kaj Radio-Aktoroj/, lanĉinta Esperantan radioelsendadon de la "Verda Stacio" en Brno - 50 j.

# SOLENA PACRENKONTIĜO EN PARDUBICE

**Programo de la V-a renkontiĝo de pacdefendantoj en KD RSM DUKLA PARDUBICE la 18.-20.3.1983**

---

**18.3.1983 - vendredo:**

9,00 h. Forveturo per aŭtobuso al Zámeček, Pardubice. Renkontiĝo kun prezidanto de antifaŝistaj rezistantoj

10,30 - 12,00 Akcepto ĉe reprezentanto de distrikto

13,30 - 14,30 Akcepto ĉe urbestro

15,00 - 17,30 Ekskurso al entrepreno TVAR

19,00 - 21,00 a/ Kunsido kun funkciuloj de urbo Pardubice - informoj pri la paclaboro eksterlande kaj enlande /por reprezentantoj/
b/ Amika interbabilado
c/ Kunveno de junularo
d/ Kunveno de ĉeĥa sekcio de MEM

**19.3.1983 - sabato:**

9,00 - 12,30 Solena renkontiĝo de pacdefendantoj. Prelegoj de partoprenantoj /ni postulas sendi prelegon ĝis la 15.2.1983 al adreso: M. Heřmerková, Wolkerova 2071, 530 02 PARDUBICE - por traduko/

14,00 - 17,00 Kulturprogramo

19,00 - 02,00 Vespero kun muziko kaj danco en granda salono de KD RSM DUKLA

**20.3.1983 - dimanĉo:**

9,00 - 13,00 Aŭtobusa ekskurso al Ležáky. Ekskurso al kastelo en Slatiňany, kie estas la monda raraĵo - hipologia muzeo

15,00 - 17,00 Ekskurso al historia parto de Pardubice kun esperantlingva prelego, preparita de D-ro Zikmunda, historiisto.

Tranoktado en Studenta hejmo kontraŭ la Kulturdomo - 1 nokto/30 Kĉs. Manĝaĵo 3foje tage - 40 Kĉs/1 tago. Partoprenkotizo 35 Kĉs - ĝi enhavas insignon, suveniron, enirbileton je kulturprogramo,

danovespero kaj dimanĉaj ekskursoj. - Partoprenkotizo estas pagota anticipe. Aliĝu ĉe M. Hemerková, Wolkerova 2071,530 02 PARDUBICE.

Komitato de Esperantista klubo de Pacdefendantoj, KD RSM DUKLA, CS - PARDUBICE sincere invitas ĉiujn pacamantajn Esperantistojn.

## VÝZVA VŠEM,

kdož mají ve svém okolí mezi svými přáteli esperantisty, kteří se zúčastnili boje proti fašismu, byli za své přesvědčení perzekvováni nebo bojovali jako interbrigadisté ve Španělsku. Udělejte s nimi interview a jejich vzpomínky si poznamenejte. U těch, kteří se svého osvobození nedožili nebo již po válce na útrapy zemřeli, zajděte k jejich příbuzným a přátelům. Zjistěte také všechny dosažitelné informace. Materiály /fotografie, zprávy z novin, ev. fotokopie jejich vlastních poznámek, dopisů apod./ zašlete na adresu

Ludvík C h y t i l , Spartakiádní 24, 750 00 P ř e r o v

který má tyto informace shromažďovat, případně zpracovat.

## GRANDIOZA LA CELO, GRANDEGA LA TASKO

Okaze de la internacia jaro de komunikado 1983 ni havas ne nur la rajton, sed ankaŭ la devon pliviĝligi nian pensadon kaj pliintensigi nian agadon pri kaj pro Esperanto. Tio estos nia humanisma kontribuo por la paco kaj internacia demokratio. Tion ni povas fari multmaniere depende de cirkonstancoj: aranĝi ekspoziciojn, debatojn, verki artikolojn, librojn, partopreni iel kaj alimaniere.

Ĉe nia informado ni devas pli kaj pli atenti la psikologian aspekton de la "konvinkado". Entute ni ne devus provi iun konvinki pri la boneco de Esperanto, ĉar tio vekas ĉe la koncernato ian "naturan sindefendan reagon", kiu ŝlosas la menson. Kiel ofte niaj "viktimoj" elturniĝas asertante, ke Esperanto estas "artefarita" /en la forpuŝa senco de la vorto/, "senviva", "malelasta", ktp, kvankam ili scias absolute neniom pri la temo. Se ni en tiaspeca vortoskermado provas pozitivigi la vorton "artefarita" analogie al aŭtomobilo kontraŭ ĉevalo en la laŭsenceco de la moderna trafiko respektive komunikado, ili tuj rejetas kontraŭargumenton: la ĉevalo tamen ne polucias... Ni bone scias ke multaj vortobildoj el biologio aŭ teknologio ne taŭgas por priskribi socian fenomenon, sed tamen tiuj falsaj bildoj estas tre drastaj, ekz. "morta", "senviva"... Kvankam ni esperantistoj estas milde ŝafaj, ŝajnas kelkfoje, ke ni portas sub nia felo ian spiritan atombombon , la instrumenton de interpopola amikeco kaj prospero, kiu teruras multajn eĉ nekonscie.

Kelkfoje iuj ŝercemuloj prenas "el sia maniko" nacilingvan vortspritaĵon kaj petas ĝin traduki en Esperanton. Komprenebla tio ne funkcias tiel facile. Por tiaj situacioj ni devas



parkeri kelkajn esperantajn versojn kaj vortŝercaĵojn, per kiuj ni povas perpleksi aŭ mirigi. Siatempe la idistoj prenis iun Esperantan "stilrompaĵon" aŭ elpensitan frazon por diskrediti Esperanton en la okuloj de la publiko, sed fakte tiametode oni povas montri la malbelecon de ĉiu lingvo, ekz. kion vi pensas pri sekva Finna frazo: Alä rääkkää räätäliä. En minä rääkkääkään. /Ne turmentu la tajloron. Mi ja ne turmentas./

J. Jäntti, Finnlando

---

## LINGUA LATINA VERSUS ESPERANTO

aneb

Krátké zamyšlení nad toponomastikou v rostlinopise

Kdybychom chtěli kovaného esperantistu vyděsit záludnou otázkou, zda má latina nějaké šance proti esperantu, např. jako dorozumívací jazyk pro vědecké pracovníky, patrně bychom neuspěli. Tázaný by opáčil s klidem Angličana: Latina? Mrtvý jazyk se zastaralou slovní zásobou, s nesmyslně složitou mluvnicí, s tolika nepravidelnými slovesy...? A tohleto, a támhleto... Hned tak by nás nepustil ke slovu; sotva by se nám podařilo namítnout, že ten mrtvý jazyk dokonale funguje v tisícovkách lékařských výrazů, v desetitisícovkách názvů z anorganické i organické chemie, v milionech jmen zoologických i botanických, ovšem velmi často za pomoci elementů řeckých, které ostatně od prvopočátků své historie ochotně asimiloval.

Snad abychom tedy začali z jiného konce: Jak je to s esperantem v oboru místních jmen? Má vůbec nějaký smysl převádět je z originálních forem na esperantské? Odpověď by zněla asi takto: Esperanto disponuje názvy zemí, i když jsou tu jakési spory o přípony. Také má vžitá jména známých řek, jezer, moří, oceánů, pevnin, poloostrovů, hor a hlavních měst. Nemělo by ovšem cenu poesperantšťovat jméno kdejakého Zapadákova. Vlastně ani není jasno, podle jakých pravidel by se to mělo dělat, zda na základě výslovnostní či pravopisné podoby. A je tu nebezpečí, že poesperantštěná jména by se tak odchýlila od originální předlohy, že by je málokdo poznal. Snad bude nejlépe ponechávat v esperantském textu formy původní.

Tak, a máme to. Můžeme tedy zkusit, jak dopadneme třeba v té botanice. Okrasná kalina VIBURNUM PRAGENSE /VIK/ se bude - podle osvědčeného vzoru: Esperantista Klubo de Praha - jmenovat: viburno de Praha. Anebo přece jen raději: viburno praga, i když to prý poněkud zavání němčinou?

Opravdu je načase si uvědomit, že latina již asimilovala nesmírnou spoustu evropských, asijských i jiných toponym. Proces vlastně neskončil a hned tak neskončí. Latina totiž není nadobro mrtvá: žijí botanikové a polatinšťují - zvláště v posledních dvou stoletích - další místní jména ze všech koutů světa. Proč? Protože potřebují jejich latinské formy pro jména rostlinných taxonů, hlavně rodů, druhů a kultivarů.

A teď trochu vážněji: jména rodů jsou z gramatického hlediska substantiva, např. COLCHICUM podle Kolchidy, starověkého názvu pro krajinu na východním pobřeží Černého moře; nebo IBERIS

podle starořímského názvu pro Španělsko: Iberia; nebo VERNONIA podle místa, kde zemřel Washington: Mount Vernon.

Přívlastky druhů jsou nejčastěji adjektivní: ARCHANGELICUS /archangelský/, BORYSTHENICUS /dněperský/, BUCHARICUS /bucharský/, GALICIENSIS nebo HALICENSIS /haličský/, LUSATICUS /lužický/, MORAVICUS /moravský/, NISKIENSIS /niský/, NITRIENSIS /nitranský/, OCHOTENSIS /ochotský/, ROSSICUS /ruský/, RUTHENICUS /rusínský/. Někdy však mají druhové přívlastky formu genitivní: CARDUCHORUM podle země kurdské, CORDILLERARUM podle Kordiller, MINARUM podle známých dolů v Brazílii: Minas Gerais,MINAHASSAE podle okresu Minahassa na ostrově Sulawesi /Celebes/.

Pravda, leckdy se botaničtí latiníci nedohodli na jednotné formě; třeba v uvedeném případě Haliče nebo např.: CRETENSIS - CRETICUS /krétský/. Jak elegantně jednoduché a zcela ustálené je toto přídavné jméno v esperantu: kreta. Tedy 1:0 pro esperanto. Podobně LIPSICUS, LIPSIENSIS /lipský/. Ale tady ouha. V esperantu bychom nejraději viděli: lejpciga, jenomže někde čteme i lajpciga, lejpziga, leipziga aj. Že by anarchie? Vyrovnáno na 1:1 ?

Což to zkusit jinak: NOVEBORACENSIS znamená newyorský, NOVEBORACUM - New York. První půlka jména je přeložena z angličtiny do latiny, druhá pouze asimilována. Výsledek se originálu moc nepodobá. Esperanto má v daném případě při stejném postupu výsledek přece jen srozumitelnější: Novjorko, novjorka. Tedy 2:1 pro esperanto. Jiný příklad: OENENSIS /innský/, OENIPONS - Innsbruck. Zde naopak je asimilována první část jména, přeložena druhá. Z toho by si však esperanto těžko vzalo příklad a namísto INNPONTO by raději zvolilo dva sblížené slovní kořeny, jeden pro řeku: Inno, inna, druhý pro město: Innsbruko, innsbruka. Zase bod pro esperanto.

Někdy latina přeložila celé jméno; např. NE/O/MONTANUS znamená neuberský podle štýrského Neubergu. Obdobou v esperantu je třeba Bonaero - Buenos Aires. I když se toto jméno lépe vžilo než těžkopádné Buenos-Ajreso, nelze překládání doporučit jako postup nejvhodnější. Asimilace je bezesporu méně násilná.

Mezi latinskými přívlastky rostlinných druhů jsme už uvedli některé, jež se podstatně liší od originálních toponym.Zde máme ještě pár příkladů: ANDEGAVENSIS /od Anjou/, GLOTTIANUS /od Glasgowa/, ISENACENSIS /od Eisenachu/, MELITENSIS /od Malty/. Esperanto se v takových případech snaží o co nejmenší poškození originálních forem; výsledná adjektiva vypadají takto: anjua, glasgova, ejzenaha, malta.

Vcelku tedy esperanto má proti latině výhodu jednodušších asimilačních postupů. Nevýhodou zatím zůstává malá ochota pustit se do podrobného normování těchto postupů a pokusit se,aby velký náskok latiny byl brzy dohnán.

RNDr Josef Kavka, CSc



# ESPERANTISTOJ ANTAŬ

PRAHA 83

MONDA ASEMBLEO POR PACO KAJ VIVO, KONTRAŬ LA NUKLEA MILITO

Ĉiu el ni jam certe scias, ke en junio tiujare nia ĉefurbo bonvenigos la pacbatalantojn el la tuta mondo. Nia STARTO en Nro 4/1982 informis nin pri tiu ĉi grava evento - kial kaj kiel ni povus kontribui por sukcesa traktado de la Asembleo.

Multaj esperantistoj scias, ke sen paco povus ekzisti nek Esperanto - kaj subtenas la porpacan movadon. Oni povas mencii ekzemple meritan laboron de la loka grupo de ĈEA en Pardubice, kies regule aranĝataj renkontiĝoj de la pacdefendantoj estas jam mondsignifaj kaj certe ne estas iu ĉeĥa esperantisto, kiu ankoraŭ ne partoprenis iun el ili. Ŝblas mencii ankoraŭ aliajn lokajn grupojn de ĈEA, kiuj ankaŭ gajnis honoran pacdefendan titolon /Mělník, Přerov, Příbram, Bor u Tachova/; oni povus laŭdi porpacan laboron de la lokaj grupoj en Jablonec, Třebíč, Ústí n/L, Cheb, Šumperk, Hořice, Ostrava-Vítkovice, Karlovy Vary ka./ Multaj esperantistoj kunlaboras kun Distriktaj Packonsilioj kaj preparas kontraŭmilitajn rezoluciojn.

Certe ne mankos iu loka grupo en nia lando, kiu ne donacus difinitan monsumon por Fondumo de Paco kaj Solidareco de Nacia Fronto de ĈSSR. Komitato de la Sekcio por Paco kaj Kunlaboro kun MEM nepre bezonas informojn el ĉiuj lokaj grupoj en nia lando - pri la porpaca agado de ĉiu esperantisto. Nin interesas ĉio - eĉ "guto malgranda" - kion vi jam faris aŭ intencas fari; skribu al ni pri aranĝitaj kaj aranĝotaj pacrenkontiĝoj, pacmarŝoj, prelegoj aŭ diversaj aliaj kontraŭmilitaj aranĝoj, pri la porpaca korespondado, pri artikoloj en gazetoj kaj ĵurnaloj, pri ekspozicioj aŭ ornamitaj propagandaj vitrinoj /sendu fotojn, se eblas!/

Eluzu proponitajn kaj al multaj grupoj jam senditajn modelajn rezoluciojn, kiujn kompilis prezidantino de la Virina Komisiono de MEM - kaj kun multaj subskriboj resendu ilin baldaŭ al s-anino Maria Turková /Vrchlického 7, 320 29 Plzeň/. Ŝi transdonos ilin al prezidanto de MEM D-ro Imre Pethes - por ke li poste publike donu ilin al la partoprenontoj de la Monda Asembleo. Ankaŭ prezidanto de nia Porpaca Sekcio intencas informi la Mondan Asembleon pri agado de la ĉeĥaj esperantistoj - tial vi ĉiuj skribu pri via porpaca agado!

Skribu tuj, daŭre kaj ĝustatempe - por ke ni povu ĉion kompili - ĝis la 31-a de majo 1983 al la suba adreso.

Alena K l e m e n t o v á ,
sekretariino de Porpaca Sekcio de ĈEA
Kpt. Nálepky 7, 360 04 Karlovy Vary

**LA TRADUKOJ DE ĈEĤAJ OPEROJ ĈE LA AGENTEJO DILIA PROPONO ANKAŬ POR EKSTERLANDAJ INTERESULOJ**

La ĉeĥa muzika komponisto Jaroslav Kadlec verkis kelkajn operojn, kies tekston tradukis en Esperanton Josef Cink. Temas pri: PRINTEMPA TAGO /Nesvadba/, BESTETOJ KAJ RABISTOJ /Hrubín/, PRI LA GRANDA BETO /Hrubín/, SOMERA RAPSODIO /Kadlec/ kaj EN SIGNO DE LA SUNO /Vrchlický/.

PRINTEMPA TAGO, BESTETOJ KAJ RABISTOJ kaj SOMERA RAPSODIO estas groteskaj unuaktaj operoj kun fabela temo. Ili estas destinitaj ne nur por infanoj, sed ankaŭ kun plezuro aŭdos kaj rigardos ilin plenaĝuloj. Tion pruvas ilia prezento sur ĉeĥoslovakaj profesiaj scenejoj kaj en televido. Ili ne havas troaj pretendoj al orkestro kaj nombro kaj voĉ-postuloj de kantistoj. Pro tio ili estas uzeblaj ankaŭ en la teatraj kolektivoj nemuzikaj, se nur la roluloj havas ordinaran kant-kapablon. Por akompano sufiĉas malgranda orkestro aŭ nur piano. Laŭ la cirkonstancoj estas permesataj en la muzika akompano eventualaj bezonaj arangoj.

EN SIGNO DE LA SUNO kaj PRI LA GRANDA BETO, ankaŭ unuaktaj fabelaj operoj, postulas jam pli vastan kaj pli nivelan ensemblon kantistan kaj orkestran.

La supre nomitaj operoj /la muzikaj kaj tekstaj materialoj/ estas je dispono ĉe la agentejo:

DILIA, Vyšehradská strato 28, 128 24 PRAHA 2, PK 34, ĈEĤOSLOVAKIO.

V. Kočvara


---

ĈEĤA ESPERANTO ASOCIO KAJ REDAKTORO DE STARTO SINCERE DANKAS AL AMASO DE GRATULANTOJ, KIUJ SENDIS SIAJN BONDEZIROJN OKAZE DE KRISTNASKFESTOJN KAJ NOVA JARO. NI DEZIRAS SAMAN AL ĈIUJ, DO ĈEFE: PACON, SANON, AGRABLAN KAJ SUKCESAN LABORON POR PROPRA SOCIO, LANDO, FAMILIO KAJ NE EN LASTA VICO POR ESPERANTA MOVADO. NI PARDONPETAS, KE NI NE POVAS AL ĈIUJ PERSONE RESPONDI, ĈAR EN TIU KAZO NE EBLUS PREPARI ĈI TIUN NUMERON DE STARTO!

---

ĈU VI JAM PAGIS VIAN ASOCIAN JARKOTIZON ? NEFORGESU, KE VIA MEMBRECO ESTAS GRAVA MORALA KAJ FINANCA SUBTENO DE LA ESPERANTO MOVADO EN NIA LANDO !!! TURNIĜU AL VIA LOKA GRUPO AŬ REKTE AL SEKRETARIEJO DE ĈEA. LA MEMBROKOTIZOJ POR TIU ĈI JARO ANKORAŬ RESTAS SAMAJ KIEL ESTINTJARE .





## ni recenzas

VIVO KAJ ARTO DE VAN GOGH. De prof. Agostinho da Silva. El la portugala lingvo tradukis Manuel de Freitas. Eldonis Portugala Eldona Rondo, Rua Anselmo Braancamp,259, 4000 Porto, Portugalio; tie mendebla por 2 internaciaj respondkuponoj. Kajero formato 15x21 cm, rotaprinta preso, 24 paĝoj. La kajero prezentas interesan legaĵon pri la vivo kaj verko de la fama nederlanda majstro en bona lingvaĵo kun nur 3 - 4 preseraroj kaj 2 - 3 lingvaj korektindaĵoj.

Kiel 11-a kajero de la serio "Enkonduko en la Kulturon" far prof. Agostinho da Silva proponiĝas al ni la biografio de la fama impresionisma pentristo Vincento Van Gogh, kies nelonga sed fekunda vivo tragike finiĝis en lia 37-a vivjaro. Li spertis ĉirkaŭ si tiom da mizero dum sia vivo en Nederlando, Londono, Parizo, vidis ekspluatatajn laborulojn en povrego, kvinjarajn infanojn laborigatajn 12 horojn tage. Sur tiu ĉi mizero en kadukaj Londonaj domaĉoj pompis "la angla prospero". Li mergiĝis humile mem en tiun proletan mizeron per asketa vivo kaj sopiris fariĝi konsolanta predikanto por la plej povraj. Baldaŭ li ekkonis, ke li per sia pentroarto povos plej efike bildigi tion, kion li sentis. Du malfeliĉaj enamiĝoj ekzilis lin el sferoj de homa amfeliĉo al kampo de arto, kie li laboris kun pasia impeto trovante siaspecan feliĉon de kreanto kaj fidelan apogon en sia frato. En sia komenca artstilo li satis bildigi motivojn preskaŭ mornajn, ŝajne monotonajn, rembrandtecajn oldulojn. Sed post sia eklogo en sudfrancia Provenco li transiris al la brilaj koloroj de la impresionistoj Monet, Silley, Pissarro, Degas, Gauguin. Sed li klopodas eviti nuran majstradon per teknikaj efektoj kaj pentras laŭ sia celado: esti artisto-predikisto kun koro kompatanta la homan malfeliĉon.

Post atako de psika perturbo li fortranĉis sian dekstran orelon kaj estis enfermita en hospitalon. Sian dolorplenan vivon li finis per pafo en bruston la 29-an de julio 1890.

Jiří Kořínek

---

D I D A K T I K A J   L U D O J
/daŭrigo/

4. KIO ESTAS SUR LA BILDO?

Sur tabulon oni pendigas por mallonga tempo bildon, aŭ oni povas ĝin projekti. La lernantoj nomas poste ĉion, kion ili vidis sur ĝi: personojn, bestojn, objektojn. Pli poste ili povas diri tutajn frazojn: Sur la bildo mi vidis ...

LUDOJ POR MEMSTARA KREADO DE FRAZOJ

1. FRAZĈENO:

La lernantoj kreas frazojn tiel, ke en ĉiu venonta frazo es-

tu unu vorto el la antaŭa frazo. La ludon oni povas diverse ŝanĝi. Ekzemple: Oni ripetas nur substantivon, nur verbon, lastan vorton, ktp.

Ekzemploj: Mi havas novan libron.
Mi legas libron.
La patro legas gazeton.
La patro laboras en fabriko. Ktp.

2. KOMPLEMENTITA PROPOZICIO:

La lernanto skribos sur tabulon primitivan propozicion. La ceteraj iom post iom ĝin kompletigas.

Ekzemple: Mi legas.
Mi legas libron.
Mi legas interesan libron.
Mi legas hodiaŭ interesan libron. Ktp.

3. TRI FRAZOJ:

El donita vorto la lernantoj kreas tri frazojn, kiuj devas kune interrilati.

Ekzemple: Hundo.
Mi havas hejme hundon.
Mi promenas kun mia hundo ĉiutage.
Mia hundo estas bela kaj obeema.

/daŭrigota/
J. Polenský

## el fervojista movado

Sekce železničářů ČES zve nové, ale i dosavadní členy ČES ke členství v sekci. V tomto roce připravujeme bohatý program a chceme se zaměřit především na spolupráci s železničářskými sekcemi v zahraničí, s účastí na jejich esperantských programech. Čeká nás cesta do Budapešti na 68. UK. Sekce železničářů ČES bude organizovat i zájezdy na různé esperantské akce v ČSSR a podle možností i do zahraničí.

Svou přihláškou za členy železničářské sekce si zajistíte včasné informace o akcích námi pořádaných. Upozorňujeme, že je také možné přihlásit se i jako SIMPATIANTO SEKCE, tj.člen který není sice zaměstnaný u ČSD, ale chce s námi spolupracovat.

BULGARA FERVOJISTO - PŘEDPLATNÉ

Mezi světové železničářské časopisy se velmi dobře zařadil BULGARA FERVOJISTO, informující o esperantském hnutí železničářů v Bulharsku. Protože v roce 1984 bude v Bulharsku kongres IFEF, bude časopis zároveň dobrým informátorem o všech kongresových přípravách.

Objednávky časopisu zasílejte na adresu předsedy žel. sekce ČES do týdne po vyjití STARTO 1/1983. Cenu nám bulharští železničáři-esperantisté zatím neoznámili.



n-ro 1, 110 00 PRAHA 1, ankaŭ persone, ĉiu merkrede kaj ĵaŭde de la 18-a horo en klubejo.

Komunaj promenoj tra Praha okazos ĉiun duan dimanĉon en monato, t.e. 10.4.,8.5.,12.6., kaj simile, de nia E-klubejo, ĉiam je la 13-a horo. Post 2-3 hora promenado reveno en la klubejon en Vejvodova str.por kafo - teo trinkado kaj amika babilado. Eblas aŭskulti Esp. diskojn, kasedojn kaj simile.

ŠUMPERK: Ekde la 14-an de oktobro 1982 trakuras tri E-kursoj. - Dum kvar monatoj la geklubanoj kolektis 928 kg de papero kaj ĉifonoj, 60 kg de neferaj metaloj kaj entute translaboris 76 brigadhorojn.

- La 23-an de oktobro 1982 okazis la kunveno kun gesamideanoj el Opava sur monto Šerák, sekvis ekskurso al Vřesová Studánka kaj Červenohorské sedlo. - La 9-an de decembro 1982 estis aranĝita Nikolao-vespero kun rememoro je d-ro L. L. Zamenhof. Ĉeestis 16 geklubanoj kaj 4 gastoj.

ZNOJMO: EK Znojmo aranĝis la 15-an de decembro 1982 solenan vesperon omaĝe al d-ro L. L. Zamenhof. En la programo estis prezentitaj kantoj, deklamado, prelego. Kaj samtempe estis preparita ekspozicio el E-libroj,gazetoj kaj bildkartoj el la tuta mondo. La tuta programo okazis en salonego de Kulturdomo.

## TURISMA MONDO

SOMERA ESPERANTISTA FAMILIA TENDARO - SEFT - '83 okazos la 13.-20.8.1983 en pitoreska regiono inter lagoj kaj arbaroj de norda GDR /tendejo C-86 THOMSDORF, ĉirkaŭ 35 km oriente de urbo NEUSTRELITZ, sude de urbeto FELDBERG/.

Kondiĉoj:

- SEFT estas kuna tendaro de Esperantistoj surbaze de memprizorgo; do ĉiu devas esti absolute memstara /tendo, manĝo, programo/;
- kiel unikan servon la Distrikta Estraro nur peras la adresojn inter la tendumantoj.

Plidetalajn informojn vi petu ĉe: Esperanto Asocio en Kulturligo de GDR, distrikta estraro, GDR-2000-NEUBRANDENBURG, Jahnstr.12.

INTERNACIA ESPERANTO - KURSEJO IEK ATENDAS VIN EN 1983

Dusemajnaj Esperanto-kursoj en VARNA, ORAJ SABLOJ k. ALBENA Majo: 3.-16.5.1983, 17.-30.5.1983; Junio: 1.-14.6.1983,16.-29. 6.1983; Septembro: 1.-14.9.1983, 16.-29.9.1983; Oktobro:1.-14. 10.1983 kaj 16.-29.10.1983. En la programo: tri lernohoroj po tage, vizito al VARNA, BALĈIK kaj TOLBUHIN, plaĝo, diskoteko,

11 landoj aŭskultis fakajn prelegojn rilatantaj al ĉeftemo. STS ČEA estis reprezentita far inĝ. J. WERNER, inĝ. Z.PLUHAŘ kaj doc.d-ro V. Novobilský CSc. Detalajn informojn pri la enhavo kaj konkludoj de la seminario legu en Budapesta Informilo.

Interkomputo-82, evento signifanta gravan paŝon antaŭen en la faka apliko de Esperanto, okazis en Budapeŝto 1982-12-27/30 organizita far Hungara Komputoscienca Societo Johano Neumann kaj aŭspiciata far UNESCO kaj IFIP/Internacia Komputoscienca Societo/. La 140 fakuloj el 16 landoj traktis en 10 sekcioj. Pli ol 100 prelegoj aperis en la 6 laŭtemaj volumoj kun sume pli ol 1000 paĝoj. Interkomputo-82 okazis kadre de la Monda Komunika Jaro kaj partoprenis ĝin ankaŭ la ĉefkunordiganto de MKJ s-ro M.Mili. El ČSSR venis 6 partoprenintoj kun 3 prelegoj.

Scienc-teĥnika sekcio de ČEA informas:

a/ La sekcia jarraporto 1982 dissendita al ĉiuj membroj de STS. La aliaj interesatoj povas peti ĝin de la sekretario Jiří Laube, Alej Rudé armády 811, 413 00 Roudnice.

b/ STS-ČEA revizias adresaton de siaj membroj. Estis dissenditaj novaj membro - aliĝontoj al la ĝisnunaj membroj. Interesatoj pri la membriĝo al la sekcio petu la aliĝilon de la sekretario.

c/ Laborplano de la sekcio por 1983 estis dissendita al la membroj.

d/ En la kadro de Scienc-teĥnika sekcio estis fondita Agrikultura faka grupo. Ĉiu el niaj membroj kiu volas kunlabori turniĝu afable rekte al estro de tiu grupo Jan HOLEC, Třebešice 81, 286 01 ČÁSLAV.

La Agrikultura grupo prizorgos laboron kaj kunlaboron laŭ jenaj interesoj: agrikulturistoj, ĝardenistoj, vinberĝardenistoj, fruktoĝardenistoj, legomĝardenistoj, bredado de bestoj, veterinaraj laboristoj kaj fakuloj, teĥnikoj en subaj subgrupoj kaj pluaj interesuloj. Ni kalkulas kunlabori kun grandaj enlandaj agrikulturistaj ekspozicioj k.s.

e/ Internacia seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. SAEST 84, okazos en Brno kun la ĉeftemo "Perspektivoj de la monda nutraj-produktado ". Precizaj informoj estos publikigataj en la venonta STARTO kaj BUDAPESTA INFORMILO.

f/ Novaj eldonaĵoj fakaj :

Jan Rybář : Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj/presita/. Redaktis inĝ. J. WERNER. Eldnonis ČEA, 1982. Prezo 16,--Kčs aŭ 6,5gld.

Jan Werner, ing : Esperanta terminaro de terminologia fako./sisteme terminaro kun difinoj en Esperanto kaj ekvivalentoj en la angla kaj ĉeĥa lingvoj/. Stencilita eldono de ČEA kun presita koverto, 1982. Enhavas 14 paĝoj formato A4. La prezo 8,--Kčs aŭ 3,00gld.
Ambaŭ eblas mendi ĉe Libroservo de ČEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1.





# el junularo vivo

JUNULARO EN ŠPINDLERŮV MLÝN

Dudekses de la gejunuloj travivis neforgeseblajn tagojn en ĉarma naturo inter 23.1. - 28.1.1983 en konata sportocentro - Špindlerův Mlýn. Ili venis el GDR, Hungario kaj CSSR.

Tie estis aranĝitaj skitagoj far Junulara sekcio de nia asocio. Partoprenis ankaŭ eksterlandaj junaj esperantistoj. Oni ŝajnas, ke tio povus esti estonte interesa aranĝo tradicia.

M.V.

ESPERANTA JUNULARO EN PARDUBICE

Esperanta grupo INTERKLUBO ĉe Urba kulturcentro en Pardubice zorgas pri Esperanta junularo, ĉar nur en ĝi oni vidas estontecon de nia movado.

De septembro ĉijare vere regule vizitadas 20 infanoj el 3. - 4. klasoj Klubon de internacia amikeco ĉe la baza lernejo en kvartalo Polabiny. Gelernantoj lernas Esperanton el nova lernolibro de s-ano Prachař, scipovas kanti jam kelkajn Esp. kantojn, ludojn kaj regas jam simplan konversacion laŭ multaj bildetoj.

Nun ili jam tre ĝojas je unuaj leteroj de eksterlandaj infanaj geamikoj.

J. Rýznarová

TRI JUNULARAJ ARANĜOJ EN GDR


JUNULARA INTENSA E-KURSO: En majo 1983 en GDR okazas printempaj ferioj por lernejanoj /kiel ĉiujare/. Tiutempe ni aranĝas intensan lingvokurson por novaj adeptoj de Esperanto kun eksterlanda instruisto. Pro la najbareco de niaj landoj tiu kurso ŝajnas speciale rekomendinda al ĉeĥaj kaj slovakaj gejunuloj.
Dato: 9. - 13. majo 1983 Partoprenantoj: 30 - 40
Kotizo: 100 Mk Loko: ĉe POTSDAM
Adreso: BV Esperanto, 1500 POTSDAM, Mangerstr. 34/36, GDR.

BICIKLA MIGRADO TRA MEKLENBURGIO: Nure turisma aranĝo estas tiu bicikla ekskurso de Berlino al Neubrandenburg. Ĉiutage oni veturas 30 - 40 km. La anoj devas sin mem provizi kaj - kompreneble - alveturigi propran biciklon. La migrado inkluzivas viziton al SEFT, jam konata esperantista tendaro.
Dato: 13. - 20. aŭgusto 1983 Partoprenantoj: ĉ. 20
Adreso: Susann REKEWITZ, 2000 NEUBRANDENBURG, Petrosawodsker Str. 57, GDR.

LABORTENDARO: Dum la dua duono de aŭgusto la distrikta estraro de SUHL organizas arbaran labortendaron. La partoprenantoj loĝos en studentaj internulejoj de Teknika Altlernejo Ilmenau kaj tie pasigos ankaŭ la duan, ripozan semajnon. La dato ankoraŭ ne estas definitive fiksita.
Dato: ĉ. 14. - 26. aŭgusto 1983 Partoprenantoj: 20 - 30
Loko: TH ILMENAU
Adreso: per Esperanto Junularo de GDR, 1080 BERLIN, Charlottenstr. 60, GDR.

Elektrický žací strojek

# esa-rot



**ROTAČNÍ ŽACÍ STROJEK ESA-ROT** je určen pro úpravu travních ploch v zahradách rodinných domků a rekreačních zařízeních. Je velmi snadno ovladatelný a pracuje bez hluku.
Žací strojek je poháněn elektrickým asynchronním motorem s trvale zapojeným kondenzátorem. Nůž je zhotoven z ušlechtilé oceli. Vodítko je dvoudílné, lze je složit pokud strojek není v provozu. Držáky vodítka umožňují nastavení vodítka do různých poloh.

Veškeré informace týkající se výrobku Vám podá odbytové oddělení ELEKTRODRUŽSTVA, Praha 8, Kundratka 17 PSČ 180 82, tel.: 829641-9.



POR MODERNA SOMERA VESTIĜO DOMO DE MODO

Dunaj

BRATISLAVA

POR VIA KOMFORTO UTILIGU ALSENDAN SERVON!

Per biciklo al Hungario

intencas veturi junaj homoj el Eŭropo. Tra nia respubliko veturos karavano de okcidentanoj,GDR-anoj,Poloj. Ĉu vi volus ankaŭ aliĝi kaj viziti tiamaniere Internacian Junularan Kongreson en Debrecen? Ni intencas atingi Debrecen-on 23an de julio. Dumvoje ni vizitos ankaŭ IJOKEN,kie ni renkontiĝos kun karavano,kiu veturos el Jugoslavio. Eblas ankaŭ resti ĉe lago VELENCEI,poste partopreni IJOKETON ĝis 23an de julio kaj trajne veturi al IJK. / Inter lago VELENCEI kaj DEBRECEN estas distanco pli ol 300 da kilometroj!/

KIU INTERESAS TUJ SKRIBU PRI DETALAJ INFORMOJ AL ADRESO DE PREZIDANTINO DE NIA SOCIA JUNULARA SEKCIO :

f-ino Marie Vančurová, Plackého 153,289 03 Městec Králové

Nun akoraŭ kelke da datoj pri turistaj junularaj aranĝoj en Hungario :

1. Junulara Esperanto-renkonto /JER/ okazos en tagoj 08-10.de aŭgusto en urbo Kapošvár. La programo estas speciale kompilita por gejunuloj. Vi povas rekte skribi al Junulara komisiono de HEA, p.k. 193, H-1368 Budapest

2. Labortendaro en Szentendre /por 100 partoprenantoj/ okazos ĝi inter 1-16.07. Oni laboras 4-6 tagoj tage. La partopreno estas tute senpaga.

3. IJOKETO / IJK-eto/ ĉe lago Velencei okazos por 400 personoj dum 17-23.07.

Do sufiĉe da aranĝoj kiujn povas niaj gejunuloj partopreni aŭ tute senpage aŭ per ne alta partoprenkotizo. Se venos pli da aliĝoj ni povas, eble, organizi ankaŭ restadon pere de CKM -agentejo, kiu estas preta helpi al ni.

Nia sekcio, sed, ankaŭ planas jam printempe kunveni en Jablonec n/Nisou dum 23.04,kiam tie estos jam tradicia aranĝo"Kilometroj de amikeco kaj paco". Vi rekte aliĝu al adreso : Esperanto, p.k. 190, 366 21 Jablonec. Ĉiu venkinto en kelkaj sportaj kategorioj /temas nur pri la marŝado / ricevos valoran kaj belan premion de la organizantoj.

## Vizito ĉe veterano

Nia la plej aĝa membro Jaroslav P A U K la 19-an de januaro ĝisvivas 85 jarojn kaj ni ĉiuj el la tuta koro deziras al li firman sanon kaj kontenton.

Dum nia vizito ĉe li ni petis pri kelkaj respondoj je niaj demandoj:

1/ En kiu jaro kaj kie Vi komencis lerni Esperanton?
Dum mia restado en urbeto Králíky en la jaro 1913 en miaj 14 - 15 jaroj mi komencis lerni internacian lingvon kiel memlernanto.

2/ Ni scias, ke Vi partoprenis UEA kongreson en Praha en la jaro 1921 kaj ke Vi persone ekkonis iun el familio de d-ro Zamenhof.



Jes, idealo pri Esperanto jam ne forlasis min eĉ dum la unua mondmilito. Poste mi sukcesis fondi en mia naskiĝurbo Jablonné n. Orl. E-klubon kaj komencis instrui 10 interesulojn. En la jaro 1921 mi partoprenis kongreson en Praha.Kongreso tre ravis min. Mi ekkonis multajn fremdajn partoprenantojn kaj estis por mi granda honoro, ke mi povis paroli kun s-ino Klára Zamenhof, kiu subskribis sin en mian memorlibreton.

